

**Printempo**  
**2002 (2)**  
Apr. - maj. - jun.

*La Vocho de Amikejo*  
iama gazeto de Neuxtrala Moresneto, oficiala informilo de

*Senlime*

Esperanto-Asocio en Euxregiono Mozo-Rejno



En cas de non distribution, renvoyer à:

S-ro Heinrich **Lentzen**,  
Feldweg 20  
B 4701 KETTENIS  
Tel. xx-32-(0)87-554326  
Mail: [lentzenh@gmx.net](mailto:lentzenh@gmx.net)



### Enhavo :

- [2. Historio Kornelimünstera](#)
- [3. Geschichte Kornelimünsters](#)
- [4. Euxregiona kalendaro](#)
- [5. Nova esperanto-kurso](#)
- [6. Verviersa angulo](#)

Eldonita de Verviersa  
Esperanto-Grupo kaj  
*Senlime*, kunlabore kun la  
Ministerio pri franclingva  
Komunumo en Belgio.

Tiu-cxi informilo senpage konsultebblas kaj kopieblas el niaj ret-pagxoj je la URL:  
<http://www.ping.be/jmjsenlime>  
H. Lentzen prizorgas surpaperigon kaj sendadon nur al la kotizintaj membroj. La belgaj valonoj, membroj de APE, ricevas la informilon ene de "Inter Ni".

#### Editeur responsable / Responsa eldonanto (franclingva):

GSM +32-486-947.957  
Mail: [JMJacques@galaxycorp.com](mailto:JMJacques@galaxycorp.com)  
J.-M. Jacques, Pl. Verte 23 bte 3,  
B-4800 VERVIERS

#### Informatie in het Nederlands / Informoj en la nederlanda:

Tel. xx-31-43-3062015  
Mail: [sinno@ibac.rwth-aachen.de](mailto:sinno@ibac.rwth-aachen.de)  
T. Sinno, In 't Oord 45  
NL-6291 VN VAALS

#### Informationen auf deutsch / Informoj en la germana:

Tel. xx-49-2406-7809  
Mail: [hogen@t-online.de](mailto:hogen@t-online.de)  
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43  
D-52134 HERZOGENRATH

#### Jara abono / aligxo : 10 EUR

**Belgio** : konto 000-0245571-64  
Esperanto-Grupo, rue Donckier 22,  
B-4800 VERVIERS

**Nederlando** : konto 57 89 43  
Senlime, Rothenbachpark 44  
6063 NM Vlodrop

**Germanio** : konto 6623201,  
Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000)  
Im Pesch 20  
D-52134 HERZOGENRATH

*Senlime* (Grupo de Verviers)  
prezentas sian novjaran donacon :

### Nova perkomputila esperanto-kurso por franclingvanoj

akirebla kiel "shareware" el la ttt-pagxoj de la asocio : detalojn legu p. 5

## Lasu vin inviti al malgranda promeno tra la historio de Kornelimünster



**J**en bona (malauktomata) traduko en esperanto de la apuda pagxo, dank'al T. Sinno kaj H. Lentzen. Dankon al ili !

**L**a bela Akena urbparto Kornelimünster havas sian fonton en la gauxla-romia religiejo „Varnenum“ kiu originas el la periodo cxirkau la naskigxjaro de Kristo. La unua popligo (logxatigo) en cxi-tiu regiono komencis dum la vojkonstruado inter Jülich (Germanio) kaj Dinant (Belgio). La religiejo mem disfalis en la jaro 260 p.K.



**A**lia fondsxtono por la hodiauxa ekskursloko kaj pilgrimejo estis la unua konstruajxo de la Benediktmonahxejo „Monasterium ad Indum“ konstruita far abato Benedikto de Aniane en la jaro 814 p.K. Oni nomas la monahxejo laux la rivereto „Inde“, kiu trafluas la lokon. La nomo „Inde“ estas keltdevena kaj signifas sxveligxanta akvo. Cxar la rivereto „Inde“ ofte forlasis sian liton pro negxdegela superakvo el la apuda Eifelo, la nomo pravis por tiu rivereto.

**L**udoviko la Piulo, la filo de Karlo-la-Granda, donacis al la abatejo grandajn bienojn – la tiel nomitan „Münster“-landeto. Pasxtejoj, agrikulturo kaj forstmastrumado, same kiel la kalk- kaj ferindustrioj akcelitaj per akvoforto, estis la ekonomia bazo de la monahxejo. La Benediktmonahxejo estis inauxgurita en la jaro 817 p.K. Okaze cxi-tiu festo, la imperiestro Ludoviko la Piulo transdonis ege valorajn relikvojn el la tresorejo de la akena „Pfalz“-kapelo (palatina). Inter ili trovigxis i. a. la Krista Antauxtuko, la Sxvittuko kaj la Mortotuko (tombotuko). Gxis hodiaux tiuj bibliaj relikvoj estas montrataj al la pilgrimantoj cxium sepan jaron samtempe kun la sankta pilgrimado al Akeno.

**E**n la jaro 875 p.K. la Mortotuko estis disigita, cxar Karlo-la-Kalvulo bezonis duonon de la sankta tuko por fondi la monahxejo en „Compiègne“. Intersxangxe la Benediktmonahxejo ricevis la sanktajn kranian relikvon de la sankta papo Kornelius kaj relikvojn de la sankta Cyprianus. Sekve al tio oni sxangxis la nomon de la monahxejo en „Monasterium Sancti Corneli ad Indam“.

**E**l tio devenigas ankaux la hodiauxa nomo „Kornelimünster“. Dum la sekularigo sub Napoleono, la malnova Benediktmonahxejo malfondigxis en la jaro 1802. Benediktanoj rekomencis siajn ordenajn tradiciojn en 1906, post novfondo iomete ekster la vilagxcentro.

**E**kde 1972, Kornelimünster estas parto de la urbo Aachen kaj unu el gxiaj plej bela urbkvartalo, cxar cxi-tie la historia urbbildo estis preskaux tute konservita. Sencele promenante tra la pentrindaj stratoj, oni nepre atingas la Korneliusfoirejon. Bordita de originalhistoriaj domoj, gxi respegulas senbrece la konstruarton de la Akena landeto. Cxiu domo rakontas sian propran historion. La regna abatejo, kiu lumigxas hodiaux en placxa flava koloro, invitigas viziti la dauxran ekspozicion „Arto el Nordrejn-Vestfaliao – subtenitaj acxetoj ekde 1945“, aux al promeno tra la abateja gxardeno.

